



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 1
1964

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
30-a (37-a) jaro
Monata

OLE BROCHMANN SLETTERØD

Dolora, nekredibla sciigo trafis nin: la 25-an de Novembro 1963 subite forpasis la nestoro de la norvega Esperanto-movado — inĝeniero Ole Brochmann Sletterød. Nur unu semajnon antaŭe li estis inter ni, vigla kaj ĉarma, en kunveno de Klubo Esperantista en Oslo. Li mortis survoje al alia Esperanta kunveno

Inĝeniero Sletterød naskiĝis la 23-an de Marto 1877. Dum multaj jaroj li estis ŝipkonstrua inĝeniero ĉe «Nylands Verksted». Li esperantistiĝis la 30an de Majo 1907, kaj post tiu tago ĝis sia morto li estis fidela, sindona esperantisto. Ni trovas lian nomon inter la membroj de la unua Esperanto-klubo en la tiama Christiania, li estis ĝia sekretario 1912—1913, kaj vicprezidanto de la nuna Klubo Esperantista 1941—1945. Li estis unu el la plej aktivaj kunfondantoj de Norvega Esperantista Ligo 1911, ĝia sekretario 1912, estrarano 1918—1920. Li estis Vicdelegito de U.E.A. 1913—1918, Delegito 1919—1925, Fakdelegito 1945—1956. Vicprezidanto de la la Skandinavia Esperanto-kongreso en Göteborg 1918. Li gvidis la unuan Esperanto-kurson inter blinduloj en

Oslo 1910, kaj poste, kune kun sia edzino, multe laboris por Esperanto inter la blinduloj.

S.ro Sletterød estis honora membro de Klubo Esperantista en Oslo kaj de N.E.L. Li fondis la ordenon de la klubo «La Verda Pantoflo» kaj la ordenon de N.E.L. «Pro Merito», kaj de ambaŭ ordenoj li estis la unua Majstro. Nun li portis la Grandan Krucon de ambaŭ.

S.ro Sletterød preskaŭ ĉiam ĉeestis, kiam okazis io rilate al Esperanto. Ĉiam afabla, ĉiam preta fari ion por la kara movado. Kiom ofte mi ĉeestis en lia hejmo kunvenojn por prepari ian Esperantan programon! Cion pri la Esperanto-movado li sciis, memoris, aŭ li povis ĝin trovi en siaj abundaj kolektaĵoj da Esperantaĵoj.

S.ro Sletterød havos gravan lokon en la historio de Esperanto en Norvegujo. Lia memoro ĉiam vivos inter ni. En niaj klubaj kunvenoj kvazaŭ mankas unu muro, kiam ni ne plu vidas lin tie. — La 30an de novembro mi havis la okazon meti florkronon sur lian ĉerkon, kiu estis volvita en la granda Esperanto-flago, kiu regule flirtis apud lia domo, prezentante la

POR NOVULOJ KAJ LERNEMULOJ

Red.: H. Fridén

Ankoraŭ sur Javo.

Viroj kaj virinoj, ĉiuj portas la tipe javajn *sarong*-jupojn. La plej simpla vestaĵo! Bruna batik-tuko, ĉiam 182 cm longa kaj 105 cm larĝa, servas por multaj diversaj aferoj. Se ĝi estas portata kiel jupo, la du finoj estas kunkudritaj, kaj rezultas tuba vestaĵo sen eĉ unu butono. Oni simple traigŝas per ambaŭ kruroj, fortike faldas la superfluan larĝon al sia korpo, kaj turnadas eksteren la supran randon, ĝis kiam la troa longo malaperas. Tiu ĉi simplega laboro povas esti farata en cent diversaj manieroj. La batiktukoj estas ankaŭ uzataj kiel sun-protektiloj, pluv-manteloj, skarpoj, lit-kovriloj, infan-portiloj, pakaĵo-tukoj kaj eĉ kiel turbanoj, laŭ la volo de la posedanto. Ankaŭ jakoj estas per ili farataj, sed pli ofte oni faras ilin el blanka aŭ roz-kolora ŝtofo. Ĉio estas facile lav-ebila. Sub-vestaĵoj estas superflujaj en tiu tropika varmego.

Laŭ la lig-maniero de la kap-tuko aŭ turbano oni tuj vidas, de kiu parto de Javo, aŭ de kiu alia insulo de la indonezia regno venas la indiĝeno. Kaj se li venas el ali-lingva parto, oni certe povos interkompreniĝi kun li per la malaja lingvo, la simpla Esperanto de la brun-haŭtuloj de tiu mondparto.

La infanetoj sidas samtempe sur la kokso patrina kaj en *slendango*, aŭ skarpo, kiu pendas de la kontraŭa ŝultro del' patrino. La haroj de la virinoj estas torditaj per la mano kaj kuŝas kiel granda nodo sur la nuko. Preskaŭ ĉiuj estas nudpiedaj. Neniu forkuris pro mia kamero. Ili ĉiuj ridetis pro mia naiveco fotografi iliajn ĉiutagajn aferojn. Mi lernis multajn

malajajn vortojn kaj frazojn por amikiĝi kun la vilaĝanoj. Ĉiam estu ĝentila, eĉ ĉe la kafo-koloruloj. (El «Ĉirkaŭ la mondon» de Joseph R. Scherer)

Klarigo:

La plej simpla vestaĵo! — «verdens enkleste kledesdrakt».

simpla — enkel (ikke «simpel») estas portata — (om det generelle, sedvanlige [blir båret], partisippet står i presens i forhold til hjelpeverbets tid.)

kaj rezultas — og resultatet blir tuba vestaĵo — rørlignende kledning (gaino)

tra-iĝi — smette igjennom tro-a longo — den overflødige lengde

protekt-ilo — beskytter pluv-mantelo — regnkappe

skarpo — skjærf lit-kovrilo — sengeteppe

estas kunkudritaj — er sydd sammen infan-portilo — barnebære

ŝtofo — stoff, tøy lav-ebila — vaskbar

super-flua — overflødig varmego — hete

lig-maniero — knytemåte indiĝeno — innfødt

kokso patrino — hoften til moren tordi — vri, vikle, dreie

nodo — knute frazo — setning (ikke «frase»)

ĝentila — høflig ĉe — hos

Informoj

de la Ekzamena Komisiono

Ekzameno plenumita. Dum decembro 1963 superan ekzamenon sukcese plenumis en Oslo s-ro Per Johan Krogstie el Løten.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.

C. Støp-Bowitz,
Prezidanto

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—.

Feliĉan novjaron!

Dezirante unu al la alia feliĉan novjaron, ni promesu, ke 1964 estu la jaro, en kiu ni — ĉiuj — faru ion valoran kaj prosperigan por Esperanto en nia lando. Konduku viajn amikojn al la klubkunvenoj, varbu ilin kiel lernantojn de la koresponda kurso, klubanigu ilin! Instru Esperanton! Verku artikolojn! Prelegu en kluboj neesperantistaj! Sed faru ĉion bone, ne fuŝu!

Kaj ne forgesu perfektigi vin mem per legado, aŭskultado kaj skribaj ekzercoj!

Sciigoj de N.E.L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado de la gazeto, ni varme petas vin bonvolu tuj pagi vian kotizon. — La *rektaĵaj membroj* bonvolu tuj sendi sian kotizon al N.E.L., Boks 942, Oslo (poŝt-ĝirokonto 100.30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi sian kotizon al la kluba kasisto. Kaj al la *klubaj kasistoj* ni same varme petas: bonvolu *senprokraste* aktive ekagi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis

por 1964, kaj ĉiukaze sendi al ni liston kaj kotizojn por la jam pagintaj klubanoj plej malfrue en la unua semajno de februaro. Antaŭan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de NEL (kr. 30,—).

Apogmembroj. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,—). Ĉi tiu kategorio celas neesperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

49-a Universala Kongreso en Hago. Ni planas komunan vojaĝon el Oslo per vagonaro. Ekiro el Oslo 30. julio je la 21.45, reveno 10. aŭgusto. Prezo tien-reen kr. 420,— (+ aldono por dormloko por tiuj, kiuj deziras). Se minimume 25, la rabato estos pli granda. Ju pli frue Turisma Servo havos informon pri interesiĝantoj, des pli bone ni povos ĉion aranĝi. — La Junulara Kongreso okazos en Amsterdam 8.—15. de aŭgusto.

50-a Universala Kongreso en Tokjo 1965. En la pasinta numero ni petis interesiĝantojn anonci sin al NEL laŭeble baldaŭ, por ke ni havu ideon pri la intereso inter niaj membroj kaj povu ĝustatempe plani ĉion. Oni povas kalkuli ke la tuta vojaĝo, inkluzive ĉion, estos farebla por n. kr. 7000,—. Se vi nur *pensas* pri partopreno, bonvolu anonci tion per simpla poŝtkarto *laŭeble baldaŭ*.

La kontorfondado. Ni permesas al ni memori pri tiu grava

• donac-fondaĵo. Vidu la artikolon
• en la pasinta numero.

• *Taskotabelo por kluboj.* Febru-
• aro. La studgvidanto kontrolas
• la laboron de la studrondoj kaj
• klopodas fondi novajn studrond-
• ojn. Antaŭ la 15a la sekr. sendas
• jarraporton pri la pasinta jaro
• al NEL kaj al la Distrikto (bl.
• A 11). La kasisto sendas skriban
• kotizpostulon al ĉiuj nepagintoj,
• kun plenigita poŝtĝirokarto aŭ
• poŝtmandato, informante ke post
• unu monato oni eventuale sendos
• poŝtan enkasigilon. Estrarkunve-
• no planas la martajn kunvenojn.

• *Raporto de la Liga Estraro pri*
• *la 4a jarkvarono.* Okazis 2 estrar-
• kunvenoj. Oni elsendis 2 cirku-
• lerojn al la kluboj, unu el ili,
• kun invito pri donacabonoj de
• Norvega Esperantisto, estis send-
• ata ankaŭ al la rektaj membroj.
• Oni decidis havigi 6 pliajn ma-
• tricarojn de la gazeta kurso. Oni
• efektivigis la enketon inter la
• membraro pri la enhavo de Nor-
• vega Esperantisto, laŭ la deziro
• de la landa kunveno. Oni kom-
• mencis kampanjon por igi la
• membrojn kolekti anoncojn por
• la gazeto. La Financa Komisiono
• serioze preparas sian agadon. La
• Estraro respondis enketon de
• Christian Michelsens Institutut pri
• la pli gravaj tutlandaj organiz-
• aĵoj kun internaciaj kontaktoj.
• Oni komencis plani komunau
• flugkaravanon al Tokjo. Oni es-
• ploras la eblecojn por aranĝi
• Skandinavian Esperantokongres-
• ion en Oslo en 1965. Oni decidis
• kunlabori en la helpagado por la
• Esperanto-organizaĵoj en la nov-
• aj landoj de Azio kaj Afriko.

• *La Liga Estraro.*

Supera ekzameno en decembro 1963

TRADUKAĴO

Synspunktene var likevel forskjellige

Under en valgkampanje i USA (1) besøkte en kjent politiker en indiansk landsby. Man hadde sammenkalt et møte, hvor politikeren holdt en tale for å verve (2) tilhengere.

«Hvis jeg blir valgt,» begynte han, «skal jeg sørge for at dere edle, rødhudede menn og kvinner blir behandlet med en slik respekt som deres herkomst fortjener.»

Indianerne svarte med høye rop «Ompa! Ompa!»

Politikeren strålte av tilfredshet og fortsatte: «Jeg skal sørge for at vaskemaskiner blir installert i alle deres hjem.»

«Ompa!» ropte indianerne.

Politikeren, sikker på suksess, bøyde hodet og sa: «Jeg skal sørge for at hver indiansk familie får egen, ny bil.» Også dette løftet møtete de med sitt «Ompa!»

Etter at han hadde sluttet sin tale, brølte indianerne sitt mest imponerende «Ompa!»

Etterpå gikk indianerhøvdningen fram foran publikum og holdt en vakker tale på perfekt engelsk. Han sluttet med å si: «Indianerne i dette reservatet (3) har med stor interesse hørt på din vakre tale. Jeg har den store ære på vegne av alle medlemmene av reservatet å gi deg en gave som tegn på vår høye aktelse. Det er vår aller vakreste indianske *ponni*» (4) Da slapp ponnien noen «pærer» ned på bakken. Politikeren kom bort for å klyve opp på hesten, da høvdningen advarende ropte: «Vær forsiktig så du ikke trækker i «ompa!»

- 1) USA = Usono
- 2) verve = varbi
- 3) reservat = rezervejo
- 4) ponna = ponio

Erling P. Næss 50-jara

Unu el la plej fervoraj propagand-
istoj, fervojisto Erling Peder Næss,
Trondheim, festis sian 50-jaran nask-
iĝtagon la 16an de januaro 1964. Li
esperantistiĝis en 1936 pere de kurso,
kiun gvidis la germano Emil Strohm-
eier en Trondheim. Post la kurso la
lernantoj fondis la esperantoklubon
«Antaŭen», kaj Næss fariĝis ĝia unua
sekretario 1936—38. En 1937 li plen-
umis la elementan ekzamenon, kaj
post la milito li aniĝis al Grupo Es-
perantista de Trondheim. Li elektigis
ĝia anstataŭanto 1945—47, sekr. 1947
—48, prez. 1949—50, 1953—55 kaj vic-
prez. 1960—61. Næss estis prez. de
Meza Distrikto de NEL 1958—60,
sekr. 1960—61 kaj anstataŭanto de-
post 1963. En 1949 li estis kunfondinto de
Norvega Esperanta Fervojista Asocio
(NEFA), kaj li estis estrarano dum
multaj jaroj. Por la leterkurso de
NEL li faris tre gravan laboron, gvid-
ante kaj administrante tiun sekcion
en la periodo 1948—63. Næss ankaŭ
iniciatis kaj faris la ĉefan laboron
pri la kompilado de kantoj por nia
populara kantlibro «Nia Kantaro», kiu
eldoniĝis en 1954. En 1951 NEL ho-
noris lin per la ordeno PRO MERITO
(Kav. de la 2a grado).

Ni sendas niajn plej varmajn gra-
tulojn al la jubileulo!

LKH

L. Friis 60-jara

Centoj da norvegoj konas s-ron L.
Friis el la Internaciaj FERIAJ Kursoj
en Helsingør kaj Hadsten, kiujn li
nun aranĝas kaj gvidas dum pli ol 25
jaroj. Ĉiuj el la partoprenintoj ad-
miras lian lertan aranĝon kaj firman
gvidon, ĉiuj memoras lian konstantan
afablecon kaj senlaca bonhumoron.
Sed oni devas scii, ke li ankaŭ verkis
bonegajn lernolibrojn kaj vortarojn,
kaj eldonis librojn, kaj aktive — kiel

tre lerta pedagogo — instruas Esper-
anton, por ke la bildo pri L. Friis estu
iom kompleta.

En la nomo de ĉiuj norvegaj amikoj
kaj admirantoj ni gratulas nian po-
pularan danan amikon okaze de lia
60-a datreveno la 23-an de januaro.

JHR.

Du britaj Akademianoj jubileas.

Profesoro d.ro W. E. Collinson estis
75-jara la 4-an de januaro.

M. C. Butler estis 80-jara la 25-an
de januaro.

EL NIA POŬTO

Leganto nia demandas:

1. Kiu estas la membroj de la Aka-
demio de Esperanto?
2. Kiujn naciajn lingvojn ili repre-
zentas?


Respondoj:

Ĉar la listo de la Akademianoj estas
longa (40 nomoj), ni ne povas presi
ĝin, sed ĝi ja estas trovebla en la
Jarlibro de UEA.

2. a) Germanlingvanoj: 1 dana, 4 ger-
manaj, 3 nederlandaj, 3 norvegaj,
2 svedaj.
- b) Latinidlingvanoj: 2 francaj, 1 hi-
spana, 1 itala, 1 kataluna, 1 portu-
gala, 1 rumana.
- c) Slavlingvanoj: 1 bulgara, 1 ĉeĥa,
1 pola, 1 rusa, 2 serbo-kroataj,
1 slovena.
- d) finn-ugrilingvanoj: 1 finna, 4 hun-
garaj.
- e) alilingvanoj: 3 anglaj, 1 ĥina,
1 greka, 3 japanaj.

Atentu, ke la informoj ne validas
ankaŭ por la landoj de la Akademi-
anoj, ĉar, ekzemple, la reprezentanto
de la portugala lingvo estas brazil-
ano, unu el la reprezentantoj de la
angla estas usonano, aliaj loĝas ne en
siaj patrolandoj.

På
norsk



*Esperanto-ungdom
i Anne-Frank-huset*

Unge esperantisters verdensforbund har sendt ut innbydelse til neste års ungdomskongress, som skal holdes i Amsterdam i 2. uke av august. Professor dr. Kok, rektor ved Amsterdams universitet, har stilt seg som beskytter for kongressen.

Deltakerne kommer til å bli innkvartert i et ungdomsherberge utenfor Amsterdam; men de fleste møter blir holdt i Anne-Frank-huset inne i byen.

Det foreligger ennå ikke detaljert kongressprogram; men innmeldingene har alt begynt å strøme inn, fordi mange regner med at deltakerantallet må begrenses. Det er på det rene at det ikke blir plass til så mange på kongressen i Amsterdam som det var med på ungdomskongressen i Vraca i sommer.

Resolusjon til lærere i alle land

Den internasjonale skolekonferanse «Esperanto i Skolen», som ble holdt i Beograd i høst, vedtok en rekke henstillinger til forskjellige instanser om at arbeidet med å innføre Esperanto i skolene måtte bli fremskyndet.

*Esperanto ved bulgarske
universiteter og høyskoler*

Esperanto fortsetter sin framgang i Bulgaria etter verdenskongressen i Sofia i sommer.

Esperanto-tidsskriftet «La Espero» melder at det bulgarske vitenskapsakademiet har godkjent innføring av Esperanto som frivillig fag ved høyskolene. Ved Sofias universitet er det to Esperanto-grupper, ved lærerhøy-

skolen én gruppe, ved handelshøyskolen i Sistov to grupper og ved handelshøyskolen i Varna én gruppe. Folkeuniversitetet i Pazargik har åpnet et Esperanto-fakultet.

Esperanto i handel og industri

Etter tilskyndelse fra utenriksdepartementet i Bonn har dr. Bruno Vogelmann i Crailsheim foretatt en undersøkelse om bruk av Esperanto i internasjonal handel. I forbindelse med denne undersøkelse har dr. Vogelmann fått en rekke positive utredninger og uttalelser fra forretningsfolk i 22 land. Et utdrag av dette materiale er nylig utgitt i bokform med en innledning av dir. Wensing i det hollandske Philips-selskap.

Sammen med direktør Wensing og Ytong-selskapets leder, dir. Carlén, har dr. Vogelmann tatt initiativet til at det blir opprettet et Institutt for Esperanto i Handel og Industri, med hovedsete i Nederland.

Nytt Esperanto-frimerke

I anledning 48-a Universala Kongreso de Esperanto i Sofia i sommer utgav det bulgarske postvesen et Esperanto-frimerke. — Bulgaria har også tidligere utgitt frimerker med Esperanto-tekst. Bare Sovjet-Unionen og Brasil har utgitt flere Esperanto-frimerker enn Bulgaria.

*Embetseksamen i Esperanto
i Amsterdam*

Ved universitetet i Amsterdam, der dosent Praganó underviser i Esperanto, har en student avlagt filologisk embetseksamen med fransk som hovedfag, Esperanto og provençalsk som bifag. — Dermed har Esperanto ved Det historisk-filosofiske fakultet i Amsterdam nådd anerkjennelse som likeverdige med fakultetets andre fag.

Kio estas K.P.V.?

En ĉi tio por Esperanto tiom favora tempo, ni ĉiuj rekonas la grandajn meritojn de nia Avangardo; de niaj Pioniroj, pro kies fido kaj sindonemo nia movado sukcesis travivi sian malfacilan kaj minacplenan infanecon.

Ilia ekzempla agado restu freŝa en nia memoro!

Ĉar pluraj dekoj el la Plej Unuaj estas ankoraŭ vivantaj, — kaj pro la fakto ke jam en la plej malgranda vilaĝo taŭga magnetofono estas disponebla, — ni kaptas la okazon atentigi Vin pri la ekzistado kaj celo de la *Konservejo de Pioniraj Voĉoj*.

K.P.V. stariĝis en Londono sub la aŭspicio de la Londona Esperanto-Klubo, honore al niaj meritplenaj Pioniroj. Ĝia celo estas konservi por la posteularo la voĉojn, (surbendigitajn), krome fotojn, — prefere diazopozitivojn — kaj biografiajn notojn,

unu: de tiuj el inter ni, kiuj fariĝis Esp.-oj jam en la antaŭa jarcento; due: de tiuj eminentaj Esperantistoj pli junaj, tamen Pioniroj en specialaj medioj aŭ fakoj;

kaj plue: kolekti ekzistantajn registrojn de voĉoj de Pioniroj jam mortintaj.

Por realigi ĉi tiun gravan celon ni urĝe bezonas la helpon de multaj sindonaj, kompetentaj kunlaborantoj en diversaj landoj. Ĉar rapida helpo estas duobla helpo, ni ĝentile invitas Vin senprokraste sendi al ni proponojn de praktika kunlaboro. La nomo de ĉiu, kiu helpis efektiviĝi nian ideon, trovos lokon en «Honora Nomaro de Kunlaborantoj de K.P.V.»

Krome ni sendos «Dank-Ateston», kiu montras en kiu formo la tenanto estas ligita al nia K.P.V. (Permesu la rimarkon ke sendi mondonacojn, por kovri la necesajn kostojn, estas unu formo da kunlaboro.)

Por niaj teknikaj kunlaborantoj jen kelkaj notoj:

Registroj estu farataj per dutrakaj maŝinoj.

Rapideco: 19 cm/sek. prefere, aŭ 9,5 cm/sek.

Direkto: de maldekstre dekstren.

Daŭro: maks. 30 min.; eĉ kelkminuta parolo bonvena.

Bendo: devus esti nova, elstara bonkvalita.

Enkonduko nur kelkminuta, de registranto, dezirata.

Kun la afabla helpo de la Esperanto-gazetaro ni esperas raporti pri la atingoj 2-foje jare.

Pro evidantaj kialoj ni ne povas konsideri fari kopiojn, krom por vere gravaj institucioj.

Servu al la Historio. Konservu iliajn Voĉojn.

Ĉion rilate al K.P.V. sendu al

Peter Schilperoord,
Administranto K.P.V.
10, Langbourne Avenue
Highgate — LONDON N. 6
Britujo.

Li ŝatis lan-ŝtrumpojn.

La psikiatro intervjuis sian novan pacienton. «Vi diras, ke vi estas ĉi tie,» li demandis, «ĉar via familio estas maltrankvila pro via gusto rilate al ŝtrumpoj?»

«Tute ĝuste,» murmuris la paciento. «Mi ŝatas lan-ŝtrumpojn,» li aldonis malgaje.

«Sed tio ja estas tute normala,» ekkriis la psikiatro. «Multaj preferas lanajn ŝtrumpojn antaŭ silkaj. Mia parte,» li daŭrigis, «mi ŝatas lan-ŝtrumpojn.»

«Ĉu vere?» respondis la paciento heliĝante. «Kiel? Ĉu kun oleo aŭ vinagro, aŭ ĉu simple kun iomete da citrono?»

VINCAS PIETARIS:

Sorto de malnoblulo

El la litova tradukis Kl. Naudzius (daŭr.)

Si mem, alkurinte, el ĉiu sia forto ekpuŝis la ĉevalon, ĉar ĝi certe jam apenaŭ ne estis trafanta per la postaĵo sur Jurgela'on; la ĉevalo hufbatis, tamen ĝia piedo rebatiĝis al la tirrimeno kaj ne atingis la ĝustmomente forsaltintan virinon. Poste ŝi ekprenis la kondukilrimenojn en la manojn kaj anstataŭis la nazon.

Jurgela, tutkorpe disbatita, kuŝis nun sur la herbejo. El vundita lia buŝo fluis sango. Bevuogis, foriginte de sur li la veturilon, nun esploris la korpon. La ostoj restis en ordo; suferis nur la haŭto kaj molaĵoj. Krom tio, la vesto estis ege ŝirdifektita. La Bevuogis-paro enportis Jurgela'on en la linsekigejon kaj kuŝigis sur la liton. Per malvarma akvo ili lavis la vundlokojn, haltigis la sangon flui el la nazo.

— Nu, nun vi, alparolis Bevuogis sian gaston, — povas ĉi tie tutan nokton kuŝi; mi kun la edzino trovos por ni lokon sur la terplanko en la antaŭĉambro.

— Ne, Joĉjo, frateto, ne! Tio ne estas bezonata; veturigu min hejmen al tio rediris Jurgela, tute sobriĝinta, — veturigu, frateto, mi ne restos ŝuldanta al vi pro la perturbo, kiun mi kaŭzis.

— Kiel vi deziras. Mi povas veturigi, tamen vi devos ordoni, ke oni reveturigi min hejmen. Min dolorige trafis la timono. Ju plue, des pli dolore fariĝas.

— Pro kio vi devus veturi, interrompis la edzon Else, — restu hejme kun la infano, mi estas sana kaj baldaŭ plenumos ĉion.

Nun jam Bevuogis-edzino sole enveturiligis Jurgela'on kaj paŝire forveturigis lin hejmen. Johano tri tag-

ojn restis kuŝanta en la lito, des pli — kiam ardis la someraj laboroj. Li nur ĝojis, ke savis la homon kontraŭ la morto. Jurgela, jen vidu, tamen forgesis rekompenci pro la «perturbo», ĝistempe forgesis eĉ danki: jen li malsanis du semajnon, jen poste ree komencis drinki, nu, al li ĉiam mankis tempo.

*

Alvenis la vintro. En la urbo estis konstruataj soldatejoj. De la hebreaĵoj (vojaĝantaj etkomercistoj) Bevuogis sciigis, ke ĉe la konstruado oni bezonas multe da laboristoj kaj ke tie estas bona profito. Tamen... oni rifuzis al li. Litovoj ne estas akceptataj. Pli malfrue li eksciis, ke ĉe la poŝtejo troveblas ŝanco por perlabori. Li iris ankaŭ tien, sed aŭdis la saman respondon: litovojn oni ne bezonas.

Tiel li mizerulo piedis tra la urbo, iradis kaj, perlaborinte 15 kopekojn per lignofendado, post kvar tagoj revenis hejmen.

La Bevuogis-paro dumsomere sukcesis ŝpari iom da mono, tamen ili sciis, ke la vintro estas longa kaj ke ankaŭ en la printempo necesos ekzisti. Pro tio ili firme tenis la monon. Nur malsato ilin igis elpreni la kvinrublan moneron el la kesto. Malsato — ne estas frato! Ankaŭ eĉ tiam ili estus provintaj prokrasti tagon aŭ du, sed la ido igis ilin al tio. Kun la mono iris Johano al Akmenukas por aĉeti sekalon. Veninte li ne eltenis kaj plendis, ke li nenie trovas laboron, do la vintro ankoraŭ ne tuj finiĝos kaj neniu povas scii, kiel ili eltenos.

— Kion vi faros, Joĉjo, tiaj aĉaj tempoj venis, mildigis la viron vilaĝano Akmenukas, — por virtaj homoj nun estas malfacila vivado surtere.

Por malestiminduloj, male, la vojo ĉie estas larĝe fermita. Ĉu vi aŭdis, ke Jurgela'on oni elektis nia komunumestro?

— Ĉu povas esti? kun miro redemandis Johano.

— Oni elektis! certigis Akmenukas kaj aldonis: — Nun atendeblas, ke iu ĉevalŝtelisto estu elektita komunumestro. Tiaj estas la tempoj... Jen, ankaŭ vi plendas, tamen atentu, ĉu la kontrabandistoj plendas? Antaŭhieraŭ unu tia alportis preĝlibron. Kaj mi aĉetis. Ĉu oni ne aĉetos, kiam oni havas nenion por lege preĝi al Dio. Nu, oni aĉetas, havigas profiton kaj ankaŭ dankas pro tio, ke oni alportas.

Johano sciis legi kaj mem bezonis preĝlibron: la malnova jam estis folie disfalinta, ne plu ordigebla. Kaj jen Akmenukas, parolante, montras novan belegan libron.

— Kaj kiom ĝi kostas? senkuraĝe demandis la homulo.

— Mi pagis du rublojn, respondis Akmenukas, — onidire, en Prusujo ĝi kostas malpli ol unu rublon. La profito, kiel mi vidas, estas bona. Provu, aldonis Akmenukas, ekrigardinte al Bevuogis. — Mi ankoraŭ unu bezonas por la knabino. Ŝi tre petas.

Bevuogis nenion respondis. Tamen li aludo forte eniĝis lian kapon. Veninte hejmen, li iradis tra la sekigejeto, laboradis, tamen ne estis trankvila kaj en la nokto malbone dormis. Elze opiniis, ke li ĉiam kaprompas kiel trovi laboron en la urbo, tial ŝi nenion al li diris kaj nenion demandis — por ke ne kaŭzu ankoraŭ pli grandan ĉagreniĝon.

La morgaŭan tagon, manĝinte la matenmanĝon, Johano alparolis la edzinon:

— Elĉjo, mi iros por serĉi laboron kaj povas okazi, ke mi ne revenos du aŭ tri tagojn, pro tio vi ne maltrankviligu. (Daŭr.)

50-a Universala Kongreso de Esperanto

TOKIO, 31. julio—7. aŭgusto 1965

ALIGKOTIZOJ

Kongresano	45,— n.gld. (180 stel.)
Edz(in)o	22,50 n.gld. (90 stel.)
Junulo ĝis 20 jaroj	22,50 n.gld. (90 stel.)
Universitata Studento ĝis 30 jaroj	17,— n.gld. (68 stel.)
Blindulo	28,— n.gld. (112 stel.)

La limdato por aliĝo laŭ la supraj kotizoj estas prokrastita ĝis la 31-a de julio 1964. Ĝis tiu dato estas akceptataj nur se pagitaj al la konstanta adreso de la Kongreso aŭ al la oficialaj Kongresaj Perantoj.

Aliĝoj el Japanujo ĝis la menciita dato estas akceptataj nur se pagitaj al la konstanta adreso de la Kongreso. Ekde 1/8 1964 por japanoj estos eble pagi en japana mono.

FLUGKARAVANO

Detalaj informoj pri la karavano al Tokio organizata de UEA estas troveblaj en la decembra numero 1963 de la revuo «Esperanto» (paĝo 222).

STATISTIKO

(ĝis 11/12-63). Argentino 1, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 6, Bahamaj Insuloj 2, Belgujo 5, Brazilo 2, Britujo 15, Bulgarujo 5, Centra Afrika Respubliko 1, Danlando 8, Finnlando 4, Francujo 28, Germanujo 17, Hispanujo 3, Hongkongo 2, Hungarujo 4, Svedujo 9, Israelo 1, Italujo 5, Japanujo 13, Jugoslavio 7, Maroko 2, Monako 2, Nederlando 19, Norvegujo 2, Nov-Zelando 3, Pollando 6, Svisujo 3, Unuiĝinta Araba Respubliko 1, Urugvajo 1, Usono 15, Venezuelo 3. Entute 200 el 32 landoj.

49-a Universala Kongreso de Esperanto

DEN HAAG, 1.—8. Aŭgusto 1964

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando

ANTAŬKONGRESO

Antaŭkongreso okazos en Bruselo (Belgujo) de la 30-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1964. La aliĝkotizo (100 b.fr.) kovras la administrajn kaj organizajn kostojn, sed ĝi ne inkluzivas manĝojn kaj ekskursojn. Detalajn informojn donas la Organiza Komitato de la Antaŭkongreso, 13 rue de la Reinette, Bruselo.

POSTKONGRESO

Oficiala postkongresa manifestacio okazos en Leeuwarden (Nederlando) de la 8-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1964. Detalajn informojn donas F.ino A. A. Laverman, Julianalaan 81-B, Leeuwarden.

SENPAGAJ PARTOPRENOJ

Esperanto-Societoj, kiuj premie disponigas senpagajn partoprenojn en la 49-a Universala Kongreso al gajnintoj de lokaj konkursoj, estas petataj anonci sin ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

ADOPTAJ GEPATROJ

Ankaŭ okaze de la 49-a Universala Kongreso estas malfermita la ebleco por ĉiu esperantisto kaj Esperanto-Societo kontribui al la Fondaĵo «Adoptaj Gepatroj». Per la kolektita mono la Loka Kongresa Komitato ebligas la partoprenon en la 9-a Internacia Infana Kongreseto al infanoj el nepagipovaj landoj aŭ de nebonstataj familioj. La fiksita kotizo por la Fondaĵo «Adoptaj Gepatroj» estas 30,— ned.gld.

NOVAJ KOTIZOJ

Ekde la 1-a de januaro 1964 validas jenaj novaj kotizoj:

Kongresano	50,— ned.gld. (200 st.)
Edz(in)o	25,— ned.gld. (100 st.)
Junulo	19,— ned.gld. (76 st.)
Studento	31,— ned.gld. (124 st.)
Blindulo	25,— ned.gld. (100 st.)

NETRAKTITAJ ALIĜOJ

Ĉe la administracio de la Kongreso troviĝas pluraj aliĝiloj netraktitaj pro la absolute nelegeblaj nomoj sur ili. Por eviti tion ni varme konsilas al ĉiu aliĝonto kiel eble plej klare (prefere tajpe aŭ preslitere) skribi sian nomon kaj adreson.

FOTO-KONKURSO

En kunlaboro kun la 20a Internacia Junulara Kongreso kaj kun la firmo Gevaert, la 49-a U.K. okazigos Internacian Foto-Konkurson. La temo de la konkurso estas el la konata «Taglibro de Anne Frank»: «Letero 15/6/1944 — Freneze mi amas la naturon, ĉu nur pro tio ke dum longa tempo mi ne povis elŝovi la nazon eksteren?» Por la gajnintoj de la konkurso estas antaŭviditaj pluraj premioj.

STATISTIKO

(ĝis 31/12 1963). — Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 15, Belgujo 23, Brazilo 2, Britujo 128, Bulgario 295, Centra Afrika Respubliko 1, Ĉeĥoslovakujo 10, Ĉilio 1, Danlando 31, Finnlando 29, Francujo 172, Germanujo 90, Hispanujo 10, Hungarujo 65, Indonezio 1, Israelo 2, Italujo 33, Japanujo 6, Jugoslavio 50, Kuvajto 1, Madagaskaro 1, Malio 1, Monako 5, Nederlando 245, Norvegujo 11, Nov-Zelando 1, Pollando 111, Portugalujo 1, Sovetunio 1, Svedujo 72, Svisujo 13, Usono 8, Venezuelo 2. — Entute 1441 el 35 landoj (pasintjare 1069 el 33 landoj).

20-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O.

8.—15. aŭgusto 1964, Amsterdam

sekr.: Kastelenstraat 231, Amsterdam Z. kas.: Vermeerstr. 7, Zandam, p.k. 686965.

La 20-a I.J.K. fakte okazos en du medioj: la dumtaga programo okazos plejparte en Amsterdam kaj en la konata Anne Frank Domo, sed dumnokte la litoj kaj aliaj allogaĵoj de la junulargastejo en antaŭ-urba vilaĝo «Broek» atendos la kongresanojn. Tiel oni kombinos la grandurbajn plezurojn kun la kampara sereno.

El Den Haag (Hago, urbo de la 49a U.K.) speciala aŭtobuso veturigos la gejunulojn al Amsterdam je reduktita tarifo. Aliaj venante vagonare aŭ sur privataj radoj trovos akceptantojn en la Centra Stacidomo.

La LKK speciale bonvenigas kapablulojn en kant(ig)a, oratora, danca, kabareta, muzika, teatra kaj aliaj amuzigaj fakoj. Ili bonvolu averti la LKK-on pri siaj eblaj partoprenoj en la programo jam antaŭ la 1-a de marto. Tiu sinanonco ne devas esti jam definitiva, sed informos nin pri la proksimuma amplekso de via partopreno.

Definitivajn programerojn ni kiel eble plej baldaŭ komunikos.

Protektanto: profesoro dr-o J. Kok, Rektoro de la Universitato de Amsterdam.

Honora Komitato: ok eminentuloj konsistigas la Honoran Komitaton.

Kotizoj: inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj programon.

Por TEJO-membroj:

	ĝis 1/4	post 1/4
malpli ol 20-jaraj:	f. 70,-	f. 90,-
20-jaraj kaj pli aĝaj:	f. 75,-	f. 95,-
	(ŝanĝoj rezervitaj)	

ne membroj de TEJO pagas f. 5,- pli.

Kalkulante la kotizon en nederlanda mono, sendu iom pli grandan sumon. Sendu ekz. \$ 20,— kontraŭvalora al f. 70,-; la surpluson ni notos kiel vian bonhavan (en la ekzemplo: ĉ. f. 2,-).

Pagmaniero: rekte al la kasisto, per ĝiro (poŝtĉekkonto) (ebla nur el diversaj okcidenteŭropaj landoj kaj el Japanujo), aŭ per internacia poŝtmandato (ebla el ĉiuj landoj, kiuj permesas pagadon al Nederlando). Sendu la aliĝilon kaj la pagon al la sama adreso. El malproksimaj landoj oni sendu *aerpoŝtan* poŝtmandaton.

Perantoj: funkcios ĉi tiun jaron laŭ alia maniero. Aliĝantoj skribu kaj pagu ĉiam rekte al LKK.

Limdatoj: aliĝo estas ebla ĝis maksimuma partopreno de 110 personoj, aŭ ĝis la dato 15-a de julio 1964-a. Vi rehavos la pagitan sumon minus f. 10,- se vi nuligos vian aliĝon antaŭ la 1-a de julio 1964-a.

Orienteŭropaj partoprenantoj: ili povas ricevi invitleteron de LKK. Krome ili kiel eble plej baldaŭ sin anoncu ĉe la konsulejo de Nederlando por peti enirpermeson.

En la junulargastejon *littuka sako* aŭ du littukoj kun kusenkovrilo devas esti kunportitaj de la partoprenantoj.

Esperanto en radio

La 29. decembro 1963 la sendstacio de Pola Radio en Gdansk dissendis sian 130an 15-minutan disaŭdigon pri Esperanto kaj en Esperanto, komencante ankaŭ la 4an jaron de dissendoj. La disaŭdigo okazas ĉiulunde je la 7.15 matene laŭ pola vintra tempo sur la mezondo 230 m. en normala programo. La redakcio de Esperanta programo bezonas konstantajn informojn kaj gratulleterojn. Adreso: Pola Radio, Gdansk, Pollando.

ĈU PRELEGOJ ESTAS EKSMODAĴO?

(El «Norges Industri» ni pruntis la jenan artikolon.)

«Prelego» kiel formo de informado.

Tre multaj homoj, almenaŭ en la urboj, dum la paso de la jaroj aŭskultas prelegojn. Ĉu tio estas natura formo por komunikado aŭ akceptado de konoj? Povas esti kaŭzo por iom diskuti tion, ĉar estas tute malkuraĝige vidi, kiel granda estas la parto de la aŭskultantaro, kiu jam baldaŭ post la komenciĝo kaj ĝis la prelego estas finita, batalas kontraŭ la dormo kun palpebroj pli kaj pli pezaj, iam kaj iam tute fermiĝantaj. Ondas la aro de balanciĝantaj kapoj kun mallaŭtaj sed bone aŭdeblaj vekiĝaj snufoj. La malmultaj aŭskultantoj, kiuj ĵus trinkis kafon aŭ havas fortan disponon por sendormeco, kaj tial estas sufiĉe maldormaj, ĉiam povas observi tion.

Kiel ĉiam devas esti esceptoj de la regulo, kiuj ĉi rilate estas kaŭzataj aŭ de intima intereso por la temo aŭ la eminenta retoriko de la preleganto aŭ ambaŭ. Sed en ĉiutaga preleg-vivo ja nur malofte la temoj prelegataj sufiĉe kaptas la intereson. Eĉ pli malofte oni aŭdas tiel eminentan preleganton, ke li jam de la komenco povas malfermegi la okulojn kaj la orelojn tiom, ke ili restas malfermitaj dum la tuta prelego. En la plej oftaj okazoj la preleganto mem malgraŭvole lasis sin persvadi fari sian prelegon. Oni tial devas demandi sin, ĉu la celo estas doni al la aŭskultantaro okazon por poste renkontiĝi por konsumi kelkajn buterpanojn kaj iom da kafo.

Nu, bone, en la pela tempo, kiun ni travivas, certe la plimulto el ni bezonas malstreĉiĝon kaj ripozon. Sed ĉu ĝuste la prelegalonoj estas la plej naturaj kaj plej konformaj lokoj por tio? La preleganto ja ankaŭ estas

kunhomo, kiu havas bonajn intencojn. Ĉu ne la tempo jam venis por diskuti, ĉu la informspeco prelego estas radikale reformenda kaj eble devas esti tute forigita, almenaŭ de aro da kampoj. Ĉu ne estus granda avantaĝo, se tiuj temoj, kiuj meritas intereson ĉe pli larĝa publiko, estus klarigataj de la konantoj-specialistoj en malgrandaj presaĵoj, tiel ke la precipe interesitaj homoj povus alproprigi al si la pensojn en trankvilo antaŭe, kiam ili estas sufiĉe maldormaj kaj kapablaj pensi? Tiam oni povus inviti al diskutkunvenoj aŭ «ĉirkaŭtablaj konferencoj» homojn, kiuj jam legis la orientigojn, kaj kiuj havas ion por diri. Tre volonte buterpanoj kaj kafo poste — la homo ja vivas ne nur el vortoj!

Kial lasi la prelegon esti speco de muro el rizkaĉo, kiun la aŭskultantoj devas trabreĉi, por alveni al la «ŝlaraf-lando» de la buterpanoj kaj babiladoj? Ĉu tio ne estas arogaĵo kaj kontraŭ la preleganto kaj la publiko?

Preleganto kaj aŭskultanto.

*

Kion diri post tia terura salvo? Kiu rekonas sin mem?

Ĉu la supra artikolo havas ion por diri al ni? Mi pensas pri la kluba vivo. En la artikolo estas propono pri presaĵoj, kiujn oni studu antaŭe. Kiom da klubanoj legus ilin antaŭe? Same pri la konferencoj, kiom da homoj anoncus sin por partopreno? Ĉu estas aliaj solvoj de la problemoj?

Oni atentu niajn specialajn celojn:

- 1) paroligi la klubanojn por ekzercado,
- 2) por novuloj lerni ankaŭ per aŭskultado,
- 3) klerigado, informoj ktp.

Jen temo por diskuto. Mi invitas la legantojn sendi al la redaktoro siajn opiniojn kaj sugestojn.

Kial ne uzi la temon por kluba diskutkunveno?

O. R.

Klubaj jubileoj

La Ponto, Horten, estis 30-jara la 4-an de januaro.

La Esperantoklubo en Mandal estis 30-jara la 24-an de januaro.

Korespondu!

22 geknaboj 13—14-jaraj, membroj de lerneja Esperantoklubo, deziras korespondi kun norvegaj samaĝuloj. Skribu al: s.ro Frank Strahl, Instruisto-direktoro, Esperanto-Klubo, Francis McClure Junior High School, Longvue Avenue, *McKeesport*, Pennsylvania, Usono.

Hispana komencanto, 39-jara veterinaro, dez. kor. kun norvegoj. S-ro Ismael-Hossany Diez, *Mataporquera* (Santander), Hispanujo.

Nova revuo en Esperanto


Ekde la de januaro 1964 en Sofio (Bulgario) aperas nova, dumonata, 32-paĝa esperanta revuo RIPOZOJ, presata sur tre luksa papero en kvar koloroj. Formato 22/31 cm. Ĝia enhavo ampleksos distran kaj belartan legaĵon, artikolojn pri turismaj objektoj kaj somerrestadejoj, pri historiaj kaj kulturaj monumentoj, pri internaciaj sportaj eventoj k. a. Ĝi regule informos pri anoncigitaj vizitoj de fremdlandaj esperantistoj al Bulgario kaj pri reciprokaj vizitoj inter bulgaraj kaj fremdaj esperantistoj.

Jara abono: 1,5 Dol. U.S.A.

Abonu per

Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam/Nederlando — aŭ
la Redakcio, bul. Tolbuhin 51,
Sofio/Bulgario

Mi konstatis . . .



ke la redaktoro de Norvega Esperantisto (vidu la artikolon frontpaĝan en n.ro 9/10, kiu aperis antaŭ kristnasko) ne estas kontenta pri la kulturo de la nuna epoko, sed devas reiri ĝis la runa epoko por trovi la plej altan kulturon. — Eble li vivas tro malfrue?

Hipopotamo

PETU PROSPEKTON PRI

ĈE I.T.C. - GEB. 114
SCHIPHOL NEDERLAND

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo

La ĉefa programero 7/11 estis parolado de ĉefkuracisto Eyvind Ek pri la temo «Vizito al Tanganyika». Unue li donis superrigardon en Esperanto pri la kunlaboro de la Sveda kaj Norvega branĉoj de la organizo «Savu la infanojn» kaj ilia laboro por helpi la malfeliĉulojn — precipe inter la infanoj — kiuj suferas de la lepra malsano.

Poste li montris grandan nombron da tre bonaj kolorlumbildoj, kiujn li mem faris dum sia lastsomeraj vizito al Uganda kaj Tanganyika. Liaj komentarioj estis tre interesaj kaj detalaj kaj donis al la ĉeestantoj ampleksan impreson pri la laborado de la Svedaj kaj Norvegaj kuracistoj kaj de iliaj kunlaborantoj, pri la naturo de la landoj kaj pri la vivkondiĉoj de la homoj kiuj vivas en tiuj landoj ĉe la Ekvatoro.

18/11. La klubanoj denove renkontiĝis kun la kluba gazeto, kiu post kelkjara ferio reaperis sub lerta redakto de John Berggreen. La enhavo de la nova numero estas tre varia. Interalie ĝi donis artikolon de la redaktoro, «Revido de Budapeŝto — 20 jarojn poste», la sugeston ke ni esperantistoj imitu la skoltan praktikon «Ĉiun tagon - unu bonan agon» — por Esperanto, Esperantajn ŝercdemandojn, «parolojn de saĝo» kaj poemojn de Petöfi. Laŭ decido de la estraro «La Vagabondo» siatempe «iris en kaŝon» por kelkaj jaroj, por poste glorie reveni. Ĝi estas glorie reveninta!

Kunveno 5/12. Zamenhoftago, Tago de la Esperanta Libro. Kirsten Ek parolis pri La Deklaracio de la Hom-

aj Rajtoj okaze de la 15-jara jubileo de la decido en UNO.

En la sama kunveno nia nun tre aktiva Teatra Grupo amuzis la ĉeestantojn per bone prezentata skeĉo bonhumora, «La Somnambulino».

La Esperantoklubo de Bergen

festkunveno 31/10. S.ino Jenny Dahl bonvendeziris al la tablo, kiu estis feste ornamita per floroj, kandeloj kaj esperantoflagoj. La vicprezidanto Agnes Hennemann parolis por la klubo kaj pri la klubaj travivaĵoj dum jaroj. Ŝi instigis la membrojn fervore labori por la klubo kaj esperis progreson kaj prosperon en la estonto. Fine ŝi legis salutleteron de la malsana prez. Kjell Offerdal, kiu sendis bondeziron al la festkunveno. Sekvis la kluba kanto, verkita de J. Jahren. Ges.oj Jenny kaj Johs. Jahren verse prezentis amuzan dialogon pri la klubo vivo dum ilia multjara membreco kluba. En «Ĉu vi memoras?» ili rememorigis pri multaj klubaj aranĝoj, kaj multaj pli malpli konataj esperantistaj gastoj kaj fremdlandaj vizitantoj. — Intervjuo:

— Kiam vi esperantiĝis s.ino Jenny Jahren ?

— Jam en 1934 je la fondo de la klubo.

— Vi kiu estas kantistino kaj ofte kantis por ni en la klubo, ĉu vi ankaŭ aliloke kantis en nia lingvo?

— Jes, mi partoprenis en propagandaj aranĝoj por Esperanto en kelkaj asocioj kiel I.O.G.T., la Paca Asocio, la Skolta Asocio kaj multaj aliaj kaj kantis esp.-ajn kantojn tie.

— Vi ankaŭ ofte kantis en la radio. Ĉu vi iam kantis esperantlingve?

— Jes, mi opinias ke mi estas la unua kiu tion faris. Kune kun mia lernanto Arne Tharaldsen kaj la kantgrupo «Melody Harmonists» mi havis multajn programojn. Ĉiam ni utiligis la okazon enmeti esperant-tekstajn

kantojn, originalajn kaj kantojn tradukitaj de mia edzo. Je preĝej-koncertoj mi uzis Esperanton anstataŭ la latinan lingvon.

— Mi memoras ke vi instruis kanthoron en la klubo, ĉu ne?

— Jes, tion mi faris. Preskau la tuta klubo partoprenis, estis por mi granda plezuro.

— Vi ĉiam estis aktiva membro de la klubo. Kiajn taskojn vi havis?

— De tempo al tempo mi estis vicprezidanto, kasisto, membro de turista komitato, distra- kaj programa komitato, finfine fakdelegito.

— Kio estis por vi la plej interesa kaj valora, kiel esperantisto?

— Estas la kontakto kun esperantistoj el diversaj nacioj kaj rasoj. — Esperanto estas mia plej valora ŝatokupo.

S.ino Aashild Birkenes tradukis kaj legis poemon «La granato havas kernon». S.ino Hartwigsen dankis pro la manĝo kaj laŭdis la belan tablaranĝon kaj bonan atmosferon kluban. Johan Rekve legis poemojn de Arne Paaske Aasen i. a. «Sur la tramo», «La monaĥino kaj la azeno», «Freŝaj floroj». Li artiste kaj vivante deklamis kaj poste ekhavis multan kaj meritan aplaŭdon. — Majken Wagle Jørgensen legis salut-leteron de Varsovio, kaj ŝi informis kaj atentigis la ĉeestantojn pri la dezirkoncerto kaj radiosaluto meze de novembro. — Thora Horntvedt plane ludis, kaj ni multe kantis, kaj bona atmosfero regis dum la sukcesplena aranĝo.

14/11. La vicprezidanto malfermis la kunvenon kaj bonvensalutis la resanigan prez.on kaj la ceterajn ĉeestantojn. Post la kanto «Esperanto lernas ni» la prez. gvidis gramatikan lecionon kaj donis ekzemplojn pri la konstruado de nia lingvo. — La sekr. riferis cirkuleron de la Ligo pri «Norvega Esperantisto» kaj petis la

membrojn esprimi siajn opiniojn pri la ĵurnalo. Ni multe diskutis la diversajn demandpunktojn, kaj fine rekomendis al la Estraro informi NEL pri la opinioj de la membroj. Fine Finn Iversen montris belan kolorfilmon pri sia feriovojaĝo. Ĉismere tra Norvegujo kaj Svedujo. Li vigle komentariis la filmon.

12/12. Post la Himno la prezidanto parolis pri Zamenhof, kiu inter liaj multaj atributoj ankaŭ estis, kaj estas, instrumento por La Penso. La prez. menciis famajn esperantistajn verkistojn kaj legis poemojn de Julio Baghy, «Se volas vi», kaj «Preĝo sur la strato». Agnes Hennemann senteme kaj bone legis la poemojn tradukitaj norveglingven de Kjell Offerdal.

Jenny Jahren vigle parolis pri la esp.literaturo, kaj instigis la membrojn aĉeti librojn. Ŝi rekomendis la ĉeestantojn rigardi kaj atente studi la libroekspozicion kaj mendi se ili trovos konvenajn librojn kaj libretojn. — Dum kafaŭzo ni kantis la kluban kanton «Inter la mont'», kaj kristnask-kantojn esperantlingvaj.

Thora Horntvedt plane ludis. Elsa Njøten regalis nin per memfaritaj, multspecaj, bongustaj kukoj.

A. Kyllingstad rakontis pri la Uneskaj afiŝoj, koncerne la tago de la Homaj Rajtoj. Li sukcesis pendigi ilin en kelkaj lernejoj. Li ekhavis aplaŭdon pro sia fervora laboro. Li ankaŭ informis pri esperantonovaĵoj, gazetoj kaj ĵurnaloj. — Majken W. Jørgensen amuze rakontis pri esperanta radiodisaŭdigo de Varsovio. — Fine ni elektis Proponan Komitaton.

Saŭda Esperantoklubb

kunveno la 1/11 ĉe s.ino K. Berge. La prez. bonvenigis la kunvenantojn kiuj estis multaj ĉifoje.

S.ino E. Matland rakontis pri la esperanta landkunveno okazinta en

Stavanger pentekoste. Si parolis esperante, kaj la rakonto estis interesa, sed ŝi bedaŭris ke nur 3 geklubanoj de nia klubo partoprenis la agrablan kaj bonan kunvenon. — Cirkulero de NEL kaj de Støp-Bowitz kiuj poste estis pridiskutataj.

La Urso, Sarpsborg,

kunvenis 7/11 kaj komencis per lingvo-instruado sekvata de gazet-transdono al la kluba biblioteko. Laŭ decido ni reabonos al Norda Prismo. La prezidanto instigis al la membroj pruntepreni esp.-librojn en la urba biblioteko. Li atentigis pri la 50-jara datreveno de la asocia prezidanto kaj mallonge priskribis liajn meritojn en lia multjara servo inter la kadro de nia movado. La kultura programero temis pri nova libro verkita de Marjorie Boulton kaj dediĉita al Zamenhof.

21/11. Post la fiksitaj programeroj la kultura kontribuo ĉifoje estis «Moderna Pekino», bela libro entenante multajn bildojn. La programo ĉesis per kolorbildo kaj -filmo farita de la prezidanto dum lia ferio.

12/12. Festkunveno en la Aŭlo de la mezgrada lernejo. Post la malfermo ni honorigis la memoron de la nestoro de la norvega esperantistaro, s-ro Ole Brochmann Sletterød, fidela membro kiu dediĉis preskaŭ sian tutan libertempon por la movado. La festparoladon faris la prez. en kutima, brila elokventeco. Samtempe li aperigis lumbildojn fotitajn en la dana, belga kaj franca metropoloj.

Grava paŝo fare de la klubo estis la decido pri subteno al novaj esp.-societoj en Afro-Azio per sendado de esperantaj presaĵoj kaj per ekkore-

spondado. Ĉiuj ĉeestantoj subskribis saluton al U.N.O. kaj al Unesko.

La nestoro de la Urso, s-ro Ludvig Lindskog, havis sian 70-jaran datrevenon pro kio la prez. transdonis al li donacon kun enmetita esperantostelo. Tio ĉi okazis tute surprize al li kaj pro tio forte impresis lin. Li kortuŝe dankis kaj emocie menciis la signifon kiun Esperanto havis por li en lia relative mallonga esperantisteco. — Nun sino Birch-Olsen invitis al alloga tabla kiu abundis de bongustaj buterpanoj kaj ĉiuspecaj kukoj. Si vere scias la arton regali.

Ole Brochmann Sletterød

(daŭr. de p. 1)

lastan saluton de la Esperanto-movado, kiu havis tiel grandan lokon en lia koro.

Dezirante pacon al lia memoro ni esprimas nian koran kunsenton kun lia kara edzino.

C. Støp-Bowitz

Norsk Esperanto-Forbund

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo

Telefon: 42 47 79

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s

(Eldonejo Esperanto A/s)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31.

Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo

Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,

Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

C. E. Holters vei 1 C, Sarpsborg: - Uzu tiun

adreson, kiam temas pri urgaj sendaĵoj.

Telefona: 54 7 27